Membro de la LEA-Komitato de SAT (Parizo)

29 (1 / 2000) LEA/G MAGAZINO

Organo de la Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj
Organ des Freien Esperanto-Bundes für deutschsprachige Gebiete
inkluzivas la organon
de la Aŭstria Socialista Ligo Esperantista (ASLE) La Socialisto

Nova jarcento komenciĝis . . .

Jen la unua numero de *Magazino* en la jaro 2000, jaro, dum kiu je la 31-a de decembro finiĝos la dudeka jarcento.

Estis eventoplena jarcento, dum kiu multaj gravaj okazaĵoj influis la sorton de la homoj: la unua kaj la dua mondmilitoj, diktaturoj, kvereloj inter kristanaj grupoj (ekz. Irlando), malpaco en la mondo de la islamo, sed ankaŭ solida paco en Eŭropo jam dum pli ol 50 jaroj. Ribeloj de la laboristoj kontraŭ ekspluatado flanke de la posedanta klaso, revolucioj en Sovetio, Germanio, Argentinio, Ĉinio kaj multaj aliaj landoj. Aliflanke, ankaŭ sukcesoj de sindikatoj post engaĝiĝo por la plibonigo de la laborcirkonstancoj. Aktivecoj de pacifistaj kaj ekologiaj grupoj, de liberpensuloj kaj de la anarkiisma movado. Eĉ la naturo prezentis malfacilaĵojn: tertremojn, superakvegojn, uraganojn, altajn gradojn de varmego, same de la malvarmeco. Malgraŭ tio – la mondo ankoraŭ ekzistas.

Pri multo oni povas memorigi, sed la spaco ne sufiĉus. La jaroj kun «19» finiĝis, la jaroj kun «20» komenciĝis. Nova jarcento espereble alportos pli bonajn eventojn, kiuj estos favoraj por la

(daŭrigo sur paĝo 2)

Bonvenon al la gekamaradoj de ASLE!

Multaj el vi certe tuj rimarkis, ke al la titolkapo de la *Magazino* aldoniĝis nova grafika elemento. La gekamaradoj de ASLE (Aŭstria Socialista Ligo Esperantista) decidis ĉesigi la apartan eldonadon de sia organo *La Socialisto* kaj kolektive aboni la *Magazinon*. Ili riĉigos ĝin per regulaj kontribuaĵoj, kiujn ili preparos en propra respondeco. La rubriko de ASLE aperas jam en ĉi tiu numero kaj ebligas konatiĝi kun ASLE kaj ĝia historio.

La redakcio kore bonvenigas la novajn gelegantojn kaj gekontribuontojn!

GM

(daŭrigo de paĝo 1)

homaro. Tio estos ebla nur, kiam homo respektos alian, kiam la deziregoj al forto, mono ne plu estos la sole aspirindaj en la vivo. Por la kompreno inter popoloj internacia lingvo estas necesa. Ni esperantistoj prezentas facile lerneblan neŭtralan lingvon: Esperanton! Ĉu la nova jarcento breĉon venkobatos – ni esperantistoj kuraĝas esperi ĝin.

Mi deziras al ĉiu LEA/G-ano kaj simpatianto sanan, sukcesplenan novan jaron, la jaron 2000!

Albert Stephan

Walter Poppeck – jubileulo en sindikato

«Multaj homoj en la Rench-valo kaj speciale en ĉi tiu loka branĉo profitis de via scio, de via malegoista aktiveco kaj de via pozitiva pensmaniero», Josef Braun, estro de la loka branĉo de la Germana Sindikata Unio, komencis per tiuj vortoj honori la jubileulon.

La urbestro de Oberkirch, Matthias Braun, laŭde aprezis la multspecajn aktivecojn de Walter Poppeck en la komunuma politiko kiel komunuma kaj subdistrikta konsilanto.

Aktiva li estas ankaŭ en diversspecaj asocioj, i.a. por la loka Esperanto-grupo, la laborista esperantista monda unuiĝo (S.A.T., Parizo) kaj kadre de la loka grupo de la mondvasta asocio *La Naturamikoj* kaj ties Esperanto-fako. Jam ek de la unua horo (1956) Walter estas aktiva membro de la Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj.

Speciale laŭdis la jubileulon la iama prezidanto de la Sindikato Kemio-Papero-Keramiko, Hermann Rappe, kiu dum dek jaroj kune kun Walter Poppeck laboris en la Ĝenerala Estraro de tiu sindikato.

«70 jarojn – fakte egalajn al homa vivo – montras, ke Poppeck apartenas al tiuj homoj, kiuj altruisme plenumas la laboron de organizaĵo», akcentis Rappe, «vi ege laboris por nia sindikato dum via sepdekjara aparteno, tamen tiu laboro ĉiam kaŭzis ĝojon por vi. La sindikato ŝuldas al vi grandan dankon.»

Apernotoj / Impressum

Eldonanto / Herausgeber:
Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj (LEA/G)/ Freier Esperanto-Bund für deutschsprachige Gebiete (LEA/G)
Renchener Str. 47, DE-77704 Oberkirch, (Tel.+Fax: (07802) 90 336)
LEA/G per SAT en TTT:
http://www.multimania.com/satesperanto/
Redakcio / Redaktion:
Gary Mickle (GM), Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin, (Tel.: (030) 453 96 47), retadreso / E-mail-Adresse:
101.121591@germanynet.de
Hans Rodewig (HR), Stammestr. 86D, DE-30459 Hannover
Albert Stephan (AFS), ĉe la supre indikita adreso de LEA/G / unter der oben angegebenen LEA/G-Adresse
Aŭtoroj responsas mem pri siaj artikoloj; la redakcio havas la rajton mallongigi aŭ rifuzi alsendaĵojn.
Redaktofino: varias (kontaktu GM sub la supre indikita adreso)
MAGAZINO aperas kvarfoje jare / erscheint vier Mal jährlich;
abonprezo / Bezugspreis *15,- DM*
La membrokotizo entenas liveradon de la bulteno.
LEA/G-konto: Jiri Proskovec
n-ro 9168 434 Postbank Essen
(BLZ 360 100 43)

Represo de materialo permesita, se la fonto estas indikita.

Fine prezentis la kolegoj Rappe kaj Stockheim, estro de la badenia-vurtemberga sindikato (Stuttgart), al la jubileulo honoratestilon kaj la Honorteleron de la sindikato Minado-Kemio-Energio.

La estraro kaj membraro de la germana laborista Esperanto-asocio (LEA/G) dankas al Walter – samtempe nome de la Sennacieca Asocio Tutmonda – pro lia kunlaboro, kiu ne finiĝu, malgraŭ lia aĝo.

Por la LEA/G-Estraro: A. F. Stephan, Oberkirch, en februaro 2000

novaĵoj

Maldekstra Forumo denove ĉe la LL-manifestacio

Ĉi-jare du kamaradoj partoprenis la Luxemburg-Liebknecht-manifestacion ĉe la Memorindigejo de la Socialistoj en Berlino. Ili disdonis kelkcent flugfoliojn pri Esperanto kaj SAT. Ĉi tiu manifestacio iom post iom dum la pasintaj jaroj fariĝis la ĉefa surstrata aranĝo de la berlinaj maldekstruloj. Kiel la amaskomunikiloj raportis, la manifestacio prokrastiĝis unu semajnon ĉi-jare pro la minaco de perfortaĵoj farita de unu individuo. (GM)

Lerngrupo en Münster

Du agemuloj iniciatis Esperanto-lerngrupon en Münster. Al la unua (kunordiga) renkontiĝo komence de februaro venis 15 homoj. Oni preparis la tuton per kelkaj afiŝoj kaj flugfolioj, kiuj invitis al la unua renkontiĝo, artikolo en la gazeto de la maldekstra medio de Münster, kaj anonco en ambaŭ lokaj tagĵurnaloj. Krome oni faris prelegon pri Esperanto ĉe la lekcio-maratono (de la Kontraŭuniversitato, kiu estiĝis dum la studenta striko) ĉe la universitato. Partoprenis 20 homoj. La Esperanto-lerngrupo klopodos lerni memstare kaj sen instruantoj. (Stefan)

La 1an de majo 2000 SAT manifestacios en Parizo!

Dum monatoj niaj belgaj gekamaradoj klopodis kontakti la sindikatistajn respondeculojn, por ke SAT havu sian lokon en la surstrata manifestacio en Bruselo. VANE! Tio montras, ke atendas nin grandaj klopodoj por konvinki la «oficialulojn». Tamen, niaj gekamaradoj esperas sukcesi por la *Unua de Majo 2001 en Bruselo*. Sed, ĉar urĝas la tempo, kelkaj parizaj SAT-anoj sin proponis por ke ni manifestaciu *La Unuan de majo 2000 en Parizo*!

Jam kelkaj sindikatoj pretas akcepti nin en la kolektiva marŝo. Pliaj detaloj aperos en venontaj numeroj de *Sennaciulo*. De nun, precipe neparizanoj kaj eksterlandanoj bonvolu anonci sian alvenon (dato, horo, alvenloko) por ke la parizaj SAT-anoj povu organizi vian gastigadon. Tiujn informojn bonvolu sendi al la Sidejo de SAT. (SAT-PK)

Protesto en Seatlo

Liland Brajant Ros' raportis: «Okaze de la konferenco de MOK (Monda Organizaĵo pri Komerco) mi partoprenis manifestacion de RARo (Rekta Agada Reto) kaj la Usona Ŝtallaborista Sindikato. RARo estas kunliga organizo de diversaferaj aktivuloj (pri mediprotektado kaj diversaj aliaj temoj).

Mi portis afiŝojn kun jenaj tekstoj:

* 'MOKU MOKon!'
* 'Rifuzu la anglan! Ne uzu la anglan! (en internaciaj komerco kaj komunikado)'
* 'ESPERANTO / internacia lingvo / Oponu anglan hegemonion!'

Kaj mi disdonis informfoliojn pri Esperanto. Fine de la tago, Seatla Polico dozis min per larmiga gaso (mia unua sperto pri tiu fama kemiaĵo!), kio estis tre larmiga.» (Liland Brajant Ros')

La Socialisto

ASLE sin prezentas

Ekde nun, estimataj gelegantoj, en tiu ĉi magazino vi legos kontribuojn de ASLE. Kio estas ASLE?

La Aŭstria Socialista Ligo Esperantista estas socialdemokrata organizo en Aŭstrio. Ĝia sidejo estas en la 15a viena distrikto, Fünfhausgasse 16. ASLE estas asociita al la Socialdemokrata Partio de Aŭstrio kaj laŭstatute celas la prosperigon de socialismo helpe de Esperanto kaj reciproke. Ni partoprenas la aranĝojn de la partio, precipe de ties provinca organizo en Vieno. Ni havas la rajton sendi delegiton al la viena partikonferenco, kutime nian kasiston k-don Reinhold Kammler. Je la unua de majo ni marŝadas kune kun la aliaj organizoj sur la Ring-bulevardo kaj montras per flagoj, skribobendoj kaj laŭtaj alvokoj al la spektantoj la ekziston de Esperanto. Sur la kunvenejo antaŭ la viena urbdomo la anoncistoj tre ofte anoncas kaj salutas nin.

Nia estraro konsistas el 5 personoj: Nia prezidanto d-ro Hermann Schnell havas la taskon prezenti la asocion al la ekstera mondo. K-dino Herta Niessner plenumas la ĉiutagan laboron kaj tiun de sekretariino. Nia kasisto k-do Reinhold Kammler regas la modestan „trezoron" de la asocio, lin asistas la dua kasisto k-do Karl Volek. K-do Emil Vokal, nia plej maljuna estrarano kontrolas la librotenadon faritan de k-do Kammler.

Ni havas 103 membrojn kaj du kategoriojn de membroj: personajn kaj organizajn. Inter niaj personaj membroj (entute 55) troviĝas interalie eminentuloj kiel ekzemple la iama urbestro de la urbo Wiener Neustadt kaj d-ro Heinz Fischer, la unua prezidanto de la parlamenta asembleo „Nationalrat", komparebla kun la germana „Bundestag".

La organizan membraron (entute 48) konsistigas krom fervojaj kaj sindikataj Esperanto-organizoj pluraj el la diversaj lokaj branĉorganizoj de la socialdemokrata partio, kiuj ĝis nun disponigis nian gazeteton *La Socialisto* al la partianoj por publika legado en la organizaejo. Ekde nun tiuj organizoj disponigos tiun ĉi magazinon.

ASLE estas asocio kun longa historio. Ĝi estis fondata en la jaro 1924 kun la nomo ALLE (Aŭstria Laborista Ligo Esperantista). Tiam la juna kompostisto Franz Jonas eksciis pri Esperanto, eklernis la lingvon kaj kunfondis la asocion. En 1926 unuafoje aperis la organo *La Socialisto*. La nazia reĝimo malpermesis la poresperantan kaj porlaboristan agadon. Post la dua mondmilito Jonas denove fondis la asocion kun la nova nomo ASLE. Tiu sama Franz Jonas, poste urbestro de Vieno kaj pli poste federacia prezidento de Aŭstrio en la jaro 1970 inaŭguris la 55-an Universalan Kongreson de UEA en Vieno

per festparolado en perfekta Esperanto, je la grandega miro de la kongresanoj.

La socialdemokrata partio longtempe subtenis Esperanton. En la junularorganizo 'Ruĝaj Falkoj' oni instruis la lingvon al la gejunuloj. La partio subtenis per rimarkindaj monsumoj la laboron de ASLE. La kleriga sekcio de la partio favoris la instruadon de Esperanto en la partiejoj. Sed iom post iom ŝanĝiĝis la sinteno de la partio rilate la Internacian Lingvon. La partiestraro komencis favori la anglan lingvon kaj tio fariĝis kvazaŭ la oficiala politiko. La mono „gutadis" malpli rapide kaj nur la sindikatoj brave subtenadas nin plu.

Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj ni plu klopodas daŭrigi nian laboron por Esperanto kaj por la socialismo. Ege malhelpas nin la fakto, ke mankas al ni la junuloj, sed tiun malavantaĝon ni dividas kun multaj aliaj asocioj. En tiu ĉi tempo estas malfacile instigi homojn je laboro por ideologiaj celoj. Se ni sukcesus establi informojn pri ni en la interreto, eble la afero status pli bone, sed ankaŭ tio estas afero de mono.

Nun, per partopreno je la *LEA/G-Magazino*, ni disponas je bona kaj taŭga rimedo informi nian membraron kaj krom tio ĉiujn legantojn de la magazino pri niaj celoj, nia laboro kaj niaj aranĝoj.

Estimataj gelegantoj, ni esperas, ke niaj estontaj kontribuaĵoj je via magazino ne enuigos vin kaj ke la kontribuado de ASLE fariĝos riĉigo kaj variigo de la enhavo de la magazino.

Kun kamaradecaj salutoj

Aŭstria Socialista Ligo Esperantista
Reinhold Kammler

Unsere nächsten Veranstaltungen:

Jeden 2.Mittwoch im Monat:
Treffen im Esperanto-Zentrum Fünfhausgasse 16.
Diskussion über das Zeitgeschehen.

1.Mai 2000:
Maiaufmarsch der Sozialdemokratischen Partei Österreichs.
Treffpunkt: 8:30 Uhr Babenbergerstraße Ecke Ringstraße.

Korekto de *Magazino* 28!



emblemo farita de Sebastian Hartwig por la retpaĝoj de la TTT-ejo de LEA/G

«Aperis» en la lasta numero de la *Magazino* sur paĝo 2 ĉi tiu grafikaĵo farita de k-do Hartwig por la TTT-ejo de LEA/G. Fakte aperis nur la stelo en unu angulo. Mi petas pardonon. Okazis tiel, ke mi tro fidis la kapablon de la fotokopiilo reprodukti grizan areon. Montriĝas, ke nepras antaŭe rastrumi. Jen la rastrumita emblemo.

GM

Bonvolu pensi pri via LEA/G-kotizo aŭ abonpago, se vi ankoraŭ ne faris tion. La membrokotizo restas senŝanĝe por 2000: DM 15 (geedza paro: DM 20). La abonprezo restas DM 15. Bv. ĝiri vian pagon kun indiko pri la pagcelo al la konto de la kasisto indikita en la *Apernotoj*.

Recenzo

Ziko Marcus Sikossek: *Esperanto sen mitoj. Mensogoj kaj memtrompoj en la esperanto-informado*. Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno 1999.

La koncepto de ĉi tiu libro estas tiel konvinka, ke oni miras pri la ĝisnuna manko de simila entreprenaĵo. Ĝi estas riĉa kompendio de faktoj, dokumentoj, citaĵoj, sobraj konsideroj kaj opinioj pri la temoj, kiujn kutime traktas la «Esperanto-informado», pri la mitoj kaj – bedaŭrinde – senhontaj mensogoj, per kiuj esperantistoj tro ofte mistraktas la «informotan» publikon. La libro malflatas la esperantistojn, ĉar ĝi dokumentas multajn perturbojn en ilia rilato al la vero kaj al la neesperantista publiko. Ĉu eble ilia sinplaĉemo malinstigis ĝis nun inventari la informadajn fuŝojn?

Sur la pli ol 300 paĝoj de *Esperanto sen mitoj* Marcus Sikossek (ĉi-poste: «MS») grupigas la temojn en ĉapitroj pri

- informado, la fuŝiĝo de la publika bildo pri Esperanto kaŭzita kaj de la movado mem kaj de eksteraj faktoroj, scienceco, resp. skolastikeco de la argumentado,
- la esperantlingva komunumo, ĝia karakterizo, foja sekteco, la rolo de «stranguloj» en ĝi, ĝia statistika amplekso, ĝia «Tradicia Esperanto-Ideologio» pri la «monda lingva problemo» kaj «fina venko» de Esperanto, ĝiaj historio kaj organizaĵoj,
- subtenantoj de Esperanto, t.e. famuloj, oficialaj kaj privataj organizaĵoj, ktp., kiuj iel pozitive rilatas al Esperanto,
- la lingvo kiel lingvistika fenomeno, ĝiaj facileco, asertita propedeŭtika valoro, la «16 reguloj», la alcelata por ĝi rolo, malamikeco de esperantistoj kontraŭ la angla, kaj multo pli,
- aliaj planlingvoj,
- Zamenhof, lia nacieco, la prisilentado de lia judeco, lia ideologia rolo kiel formulinto de la «interna ideo» kaj
- kvar manifestoj, kiuj prezentas ideohistoriajn turnopunktojn de la movado (Bulonja Deklaracio, Principaro de Frostavallen kaj la tezoj de Lapenna, la Manifesto de Raŭmo kaj la Manifesto de Prago).

Aldoniĝas vere ampleksa bibliografio.

Post la tralego de ĉi tiu libro, iĝas klare, ke vanas la ofte proponataj reklamkampanjoj kun la multekosta asisto de profesiuloj. Nenio povas anstataŭigi la lucidan prezenton de verkonformaj argumentoj, historie kaj science bazitaj, fare de la esperantistoj mem.

Esperanto sen mitoj fakte havas du ruĝajn fadenojn: unu ĉefan, tiun de la senmitigita informado, kaj akcesoran, la polemikon favore al la raŭmismo kaj kontraŭ la «finvenkismo», elemento de tio, kion MS nomas la Tradicia Esperanto-Ideologio (TEI). Tio ŝajnas parte pravigita: la informado evidente devas priparoli, kiucele Esperanto entute ekzistas kaj kial homoj lernas ĝin. Konsiderante, ke la devo de objektiva informprovizanto estas *priskribi* la opinidiferencojn inter esperantistoj, la apologio de la raŭmismo, kvankam interesa kaj pensiga, efikas foje kvazaŭ fremda al la unuavica celo de la verko. Por la aŭtoro, la idea agrafo inter la du temoj ŝajnas esti la tezo – bedaŭrinde ne ellaborita kaj argumentita – ke la propagandaj bombasto kaj malveremo estas kvazaŭ naturaj akompanaĵoj de la TEI, dum la objektiveco en informado, kiu estime traktas la informaton, kvazaŭ nature sekvas el la raŭmismo.

Malgraŭ la temamplekso (vidu supre), sentiĝas la manko de unu grava temo. Menciita estas unuloke la ideo de iuj, ke Esperanto povus signife helpi «savi» malgrandajn etnojn de malapero, sed ĝi ne estas plu pritraktita. Tiu ĉi malmodesta reklamaserto laŭ mia sperto regule aperadis en la informado dum la pasintaj jaroj. Se mia memoro ne trompas min, ĝi unue aperis komence de la 70aj jaroj kiel esperantista aldonaĵo al la koncepto de «etnocentrisma federalismo». Temas pri doktrino ellaborita de kelkaj etnistoj, kiu premisas la administran reorganizon de Eŭropo per la kreo de formale egalaj etne difinitaj regionoj, ankaŭ por la nunaj etnaj malplimultoj de Eŭropo, en la kadro de eŭropa federacio. Per la eŭropnivela uzado de Esperanto kadre de tia aranĝo oni volis akcenti la formalan egalecon de la etnoj. Post nelonge aperis en la informado la laŭaserta «sava» rolo de Esperanto por etnaj malplimultoj. Laŭ mia takso tia argumentado estas senbaza, kaj ĝi estas vere aktuala problemo, kontraste kun la simile senbaza ideo de «monda paco per Esperanto», kiu praktike malaperis el informiloj, krom en tre singardaj formuloj.

Mankis al mi ankaŭ pli ampleksa pritrakto de la unuopaj strategiaj ideoj, kiuj ofte influas la eldirojn en la informado kaj kiuj ne tiel glate reduktiĝas al la dikotomeco «TEI» kaj «raŭmismo». Kelkaj «finvenkismaj» konceptoj penas *ne* kredigi, ke la venko proksimas aŭ ke ĝi povus okazi ene de la nuna monda konstelacio de politikaj fortoj. Ankaŭ raŭmismaj argumentoj varias inter idealismo kaj postĉaso de la «bona etoso».

MS emas trodesegni la dogmismon de la TEI-anoj, la sektismon en la movado kaj foje ankaŭ la fuŝecon de la ĝisnuna informado. «La rezigno pri la fina venko aŭ pri la kredo ke ĝi estus almenaŭ dezirinda estas en la okuloj de ĝisostaj TEI-anoj blasfemo» kaj «La TEI jen montras la malagrablajn signojn de ideologio, nome dogmismon kaj agresemon kontraŭ deflankiĝantoj kaj skeptikuloj» estas karakterizaj eldiroj (p. 59). La ĉiam lama gazetara kaj aliloka debato pri ĉi tiuj temoj montras la malon: la formalaperon de agresemaj dogmuloj. Aŭ: «Multaj esperantistoj kredas ke la demandoj pri la enhavo de nia informado estas jam responditaj: esperanto estas la plej perfekta lingvo de la mondo, kaj se ĉiuj homoj lernus ĝin, tiam estus eterna monda paco.» (p. 23) Pli ĝuste estus precizigi, ke temas nuntempe pri malmultaj intelekte ne tre dotitaj individuoj, kiuj ofte ne regas la lingvon kaj ne sekvas la debatojn en la komunumo.

MS volas senbalastigi la publike prezentatan biografion de Zamenhof je hagiografiaj trajtoj kaj mitoj. Li taksas grava la demandon pri la etneco de Zamenhof kaj atribuas la kreon de «pola» Zamenhof almenaŭ parte al la antisemitisma provo kaŝi lian judecon. Tio estas serioza akuzo. Bedaŭrinde, li ne sufiĉe konsideras aliajn eblajn klarigojn de la ideo pri la poleco de Zamenhof. La naciisma imago, kiu komprenas la ŝtatanecon de homo kiel ties partikularecon, dominis ĝis antaŭ kelkaj jardekoj, ankaŭ ĉe esperantistoj. En la kazo de Zamenhof temas pri la pola ŝtataneco, kiun li pro la tiama neekzisto de pola ŝtato ne povis havi. Nur pli poste etnismaj konceptoj populariĝis (kune kun la termino «etno» mem). Krome, ĝis hodiaŭ ekzistas reakcia ideologio en Pollando, kiu reaperadas kun ŝoka ofteco, laŭ kiu «vera polo» estas nepre katoliko – kaj ne judo. Post la fondo de la pola ŝtato estis progresiva, ne antisemita ago kontesti tion per la aserto de la rekta malo. Al mi ŝajnas, ke individuoj el etne miksitaj medioj povas havi duoblan aŭ pluroblan etnecon, kaj difini «la» etnecon de tiuj homoj fariĝas kalkulado de muŝoj, kaj MS bedaŭrinde fordonas sin al ĝi, kiel aliaj antaŭ li.

La socia situo de MS – eŭropa intelektulo kun lingvoscioj kaj do unu el la avantaĝitoj de la nuna monda sistemo de komunikado – faras sin rimarkebla ĉe lia glata neado de la «monda lingva problemo», laŭ li esence elpensaĵo de la esperantistoj. Per tiu akcepto de la nuna lingva realo, MS akordiĝas kun la aktuala politika klimato en la mondo, en kiu ĉia koncepto pri socia egaleco havas malaltan konjunkturon. Li draste atakas per tio la progresivan idean kernon de la Esperanto-movado, tute alie ol per sia nekredo je la «fina venko», pri kiu ĉiu devus intertempe koncedi, ke ĝi eble estas realisma.

Freŝiga estas la preteco de MS akre kritiki ankaŭ aŭtoritatulojn (p. 219: «Se la esperanto-komunumo liberiĝus de Zamenhof, tio estus same freŝa vento kiel la scienca liberiĝo el la katenoj de la Biblio en la 19a jarcento.»). Same la preteco rekte kritiki aferojn, kiujn aliaj evitas pridiskuti (la trompa nomŝanĝo de Esperanto al «ILo» entreprenata de H. Frank k.a., la efektive seriozajn mankojn en la leksiko de la lingvo, kiujn la «genia afiksa sistemo» ne ĉiam povas kuraci, la malmultnombrecon de la parolantaro – kies nombron li taksas ĉirkaŭ 40.000 – kaj la abundon de fuŝparolantoj inter ili). La detala kritiko de tre multaj falsaĵoj faras la verkon bonega konsultilo por ĉiu, kiu ĉe la informado volas ne enfali la malnovan kaptilon: kopii la stultaĵojn kaj mensogojn de antaŭaj informiloj, kiuj siavice ilin kopiis de ankoraŭ pli malnovaj.

Preskaŭ ĉiu paĝo instigas pensi pri la etika demando, kiun prezentas la problemo de vero kaj malvero. Ĉi tiun problemon MS volus solvi laŭ la sola maniero, kiu montras al la informato la ŝuldatan respekton: favore al la vero. Plurloke li kritikas naivajn prezentojn, kiuj igas kredi, ke esperantistoj kontraŭas la lernadon de aliaj fremdaj lingvoj ol Esperanto, aŭ malestimas ĉian internaciecon, kiu baziĝas sur aliaj lingvoj ol Esperanto. Parenca fenomeno, tre sagace kritikata de li, estas la t.n. *trilingva modelo* proponita de Lapenna kaj poste ripetata de aliaj. Tiu modelo premisas, ke ĉiu homo parolu la regionan dialekton de sia regiono, la nacian lingvon de sia lando kaj la internacian lingvon Esperanto. MS prave atentigas pri la ekzisto de sociaj realecoj, en kiuj tia lingvohierarkio neniel povas validi, kaj konkludas: «Oni ne inventu kaj propagandu tiajn listojn kaj modelojn; homoj mem scias, kiujn lingvojn ili bezonas. Ni povas nur atentigi pri kromaj ebloj kaj pliriĉigoj (ekz. esperanto)».

Ĉiuj ĉi temoj ne malpli gravas por la maldekstra Esperanto-medio ol por aliaj medioj. La informaj klopodoj de la LEA-oj multrilate paŭsas la fuŝaĵojn, kiujn faras «neŭtralaj» medioj. Ankaŭ SAT ne povas delikate ĉirkaŭpaŝi la bazan demandon de la «movado» per atentigo pri la «peresperanta» karaktero de la asocio. Okazas antaŭ niaj okuloj paradigmoŝanĝo en la «Esperanto-movado», kies plimulto nun rapide transiras al la koncepto de «Esperanto-komunumo» kaj enterigas la esperojn je «fina venko». La ĵusa novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA ilustras tion. SAT abdikus sian politikan rolon, se ĝi ne kapablus diskutigi siajn membrojn kaj publike partopreni la debaton, kiu akompanas la paradigmoŝanĝon.

De *Esperanto sen mitoj* mi sentas min mem forte instigita revizii, kelkloke funde, la informilojn, kiujn mi faris kadre de la Maldekstra Forumo kaj kies mankojn mi pli ekkonsciis dum la legado. Kaj mi estas certa, ke tiu de la aŭtoro celata efiko videbliĝos ĉe aliaj. La praktiko do pruvos la valoron de la verko.

GM

Broŝuroj de Maldekstra Forumo Berlino: *Esperantistische Weltbilder* de Wojciech Usakiewicz (1a parto)

Jen eltiraĵo el la unua broŝuro de la serio *Esperanto und das internationale Sprachproblem*. Ni prezentas ĉi tie la unuan el ĝiaj tri partoj, kiu pritraktas la hilelismon/homaranismon de Zamenhof. La sekvantajn du partojn ni prezentos en la venontaj numeroj de la *Magazino*.

- En la pli temspecifa serio *Esperanto und das internationale Sprachproblem* aperis ĝis nun ĉi tiu kaj du pliaj broŝuroj: *Lazarus Ludwig Zamenhof* de Gaston Waringhien (kun *Brief über die Entstehung des Esperanto* de Zamenhof) kaj *Esperanto und Anarchismus* de Will Firth. La broŝurojn de ĉi tiu serio ni ĝis nun vendas po DM 1,20.
- En la pli ĝeneralinforma *info-serio* aperis ĝis nun *Was ist Esperanto? Wozu Esperanto?* kaj *Eine andere Kommunikationsidee: Esperanto*. Ilin ni vendas po DM 0,80.

Esperanto und das internationale Sprachproblem 1

Wojciech Usakiewicz:

ESPERANTISTISCHE WELTBILDER

- **Der Hillelismus / Homaranismus von L. L. Zamenhof**
- **Der Anationalismus von E. Lanti**
- **Das Kasohinien von S. Szathmári**

(aus Usakiewicz, Wojciech: *Esperancja – Kultura i kulturotwórcze mechanizmy*, Instytut Kultury, Warschau 1989, S. 71-101; übersetzt von Gary Mickle. Dieser Text wird mit freundlicher Genehmigung des Autors veröffentlicht.)

Maldekstra Forumo Berlin

la titolpaĝo de *Esperantistische Weltbilder*: eldono 2.0 de 1997

Der Hillelismus / Homaranismus von L. L. Zamenhof

Esperanto stellte in Zamenhofs Konzept den einen Teil eines breiteren Programms dar, das er anfangs Hillelismus und später Homaranismus nannte. Quelle der Idee waren Überlegungen zur Lage des jüdischen Volkes. In seinen jungen Jahren interessierte sich Zamenhof für den Zionismus. (Es war die Entstehungszeit der Ideologie der Bewegung, noch einige Jahre vor der Veröffentlichung von Theodor Herzls ***Der Judenstaat*** 1896.) Er nahm an der Diskussion zum Thema des Standortes eines künftigen jüdischen Staats teil – nachgedacht wurde damals, ob die Wahl auf Palästina oder die Vereinigten Staaten fallen sollte. Der nationalistische Charakter des sich entwickelnden Zionismus stimmte mit Zamenhofs Ansichten nicht überein und verleidete ihm die aktive Teilnahme. 1914, fast zwanzig Jahre später, erteilte der Schöpfer des Esperanto eine eindeutig ablehnende Antwort auf die Einladung zur Mitarbeit in der sich gründenden Jüdischen Liga: «Ich muß selbst leider abseits stehen von dieser Sache, da ich aus Überzeugung *homarano* bin und mich weder mit den Zielen noch mit den Idealen eines bestimmten Volkes oder einer bestimmten Religion verbinden kann. Ich bin tief überzeugt, daß jeder Nationalismus ein einziges großes Unglück für die Menschheit ausmacht, und daß die Schaffung einer harmonisch zusammenlebenden Menschheit das Ziel aller Menschen sein sollte. Zwar ist der Nationalismus unterdrückter Völker – als natürliche Verteidigungsreaktion – um Vieles leichter verzeihlich als der Nationalismus unterdrückender Völker, aber so schändlich der Nationalismus der Starken ist, so unvernünftig ist der Nationalismus der Schwachen. Sie bringen einander hervor und stützen sich gegenseitig, womit sie einen Teufelskreis des Unglücks schaffen, aus dem die Menschheit nicht herauskommt, es sei denn, jeder von uns gibt seine gruppenbezogene Selbstverliebtheit auf und bemüht sich, auf vollkommen neutralem Boden zu stehen.«[1]

Lazarus Ludwig Zamenhof (1859-1917)

Die Grundsätze des Hillelismus und des Homaranismus wurden in drei Texten beschrieben. ***Dogmoj de hilelismo*** (Dogmen des Hillelismus) wurde durch die Zeitschrift ***Ruslanda Esperantisto*** (Der Esperantist Rußlands) im Januar 1906 abgedruckt. Der Artikel erschien anonym, als Brief des ersten Hillelistenkreises. Gleichzeitig kam eine Einzelbroschüre heraus. Das Erscheinungsjahr entspricht allerdings nicht dem Entstehungsdatum des Textes, der spätestens von 1901 stammt.[2] ***Homaranismo*** (Homaranismus) erschien 1906, ebenfalls anonym, als verbesserte und vervollständigte Version der ***Dogmoj de Hilelismo***. Eine letzte Ausgabe erschien 1913. Sie wurde in Madrid herausgegeben. Der Verfasser unterschrieb mit Vor- und Nachnamen: Ludwik Zamenhof.

Die Ablegung der Anonymität war mit Zamenhofs Rückzug aus dem öffentlichen Leben der Esperantisten verbunden. Auf dem Krakauer Weltkongreß von 1912 erklärte der Schöpfer der internationalen Sprache in seiner achten Kongreßrede: »Jetzt, wo die Reife unserer Sache schon außer Zweifel liegt, wende ich mich an Euch, liebe Kollegen (*samideanoj*), mit einer Bitte, die ich schon lange an Euch richten wollte, die ich aber recht lange aufgeschoben habe, da ich ein verfrühtes Hervortreten befürchtete. Ich bitte, mich von der Rolle zu befreien, die ich in unserer Sache – aus natürlichen Gründen – fünfundzwanzig Jahre lang gespielt habe. Ich bitte, in mir ab heute keinen 'Meister' (*majstro*) zu erblicken und aufzuhören, mich mit diesem Titel zu beehren. Ihr wißt, daß ich am Anfang unserer Bewegung ausgesagt habe, daß ich nicht der Herr (*mastro*) des Esperanto sein wollte und alle Verfügungsrechte auf Esperanto den Esperantisten selbst vollkommen übertrage. Ihr wißt auch, daß ich ab der damaligen Zeit immer loyal gehandelt habe, sowie ich wenigstens versucht habe, entsprechend dieser Erklärung tätig zu sein. (...) Aber aus der Erwägung heraus, daß unsere Sache bis zur Zeit seines Erstarkens eine Art Banner aus Fleisch und Blut braucht, habe ich fünfundzwanzig Jahre lang – in Übereinstimmung mit Eurem Willen – diese Rolle gespielt, so gut ich konnte, und geduldet, wenn auch sehr ungern, daß Ihr in mir einen Anführer und Meister gesehen habt. (...) Aber erlaubt mir jetzt endlich, meine Rolle abzulegen. Dieser Kongreß ist der letzte, auf dem Ihr mich *vor* Euch seht: später, so ich zu Euch kommen kann, werdet Ihr mich immer nur *unter* Euch sehen.«[3] Auf diese Entscheidung bereitete sich Zamenhof mit Sicherheit viel früher vor, wie er in seiner Rede auch erwähnte. Vernünftige Überlegungen zwangen ihn 1905, mit dem Projekt der Erklärung von Boulogne hervorzutreten. Nur in dieser Weise konnte er die Funktionsfähigkeit des Esperanto unter Menschen verschiedener Überzeugung gewährleisten. Individuelle Akzente klangen aber bei allen seinen Kongreßauftritten an. In Boulogne sah er sich durch Druck von seiten der Elite der Bewegung (zu der damals hauptsächlich Franzosen gehörten) gezwungen, eine Strophe aus seiner zum Anlaß des Kongresses vorbereiteten Hymne zu streichen. In dieser war von der Einheit der verschiedenen Religionen beim Aufbau einer Welt des Friedens die Rede. Am stärksten brachte Zamenhof allerdings seine Überzeugungen ein Jahr später in Genf zum Ausdruck: »Damit unsere Arbeit Früchte trägt, müssen wir uns vor allen Dingen über die *innere Idee* des Esperantismus klar werden (...). Wenn wir, die Vorkämpfer des Esperanto, der breiten Öffentlichkeit aus eigenem Willen das volle Recht gegeben haben, Esperanto ausschließlich von der praktischen Seite zu betrachten und es nur zum eigenen Vorteil zu benutzen, so gibt das natürlich niemandem das Recht, von *allen* zu verlangen, im Esperanto nur eine praktische Angelegenheit zu sehen. Leider haben sich in letzter Zeit unter den Esperantisten Stimmen erhoben, die sagen: 'Esperanto ist *nur* eine Sprache; vermeidet es sogar im privaten Bereich, Esperanto mit einer *Idee* zu verbinden, denn sonst wird man denken, daß wir alle diese Idee hegen, und wir werden verschiedenen Leuten mißfallen, die diese Idee nicht mögen. (...) Wenn wir, die ersten Vorkämpfer des Esperanto, zum Verzicht auf alles Ideelle in unserer Tätigkeit genötigt werden, werden wir zornerfüllt alles zerreißen und verbrennen, das wir für Esperanto geschrieben haben, schmerzergriffen die Arbeiten und Aufopferungen unseres ganzen Lebens vernichten und den grünen Stern, der auf unserer Brust ruht, weit von uns fortwerfen und mit Abscheu aufschreien: 'Mit einem *solchen* Esperanto, das ausschließlich Zwecken des Handels und der praktischen Nützlichkeit dienen soll, wollen wir nichts zu tun haben!'«[4] Nach seinem offiziellen Rückzug aus der Esperanto-Bewegung fühlte sich Zamenhof nicht verpflichtet, Zurückhaltung im Sinne der Erklärung von Boulogne aufrechtzuerhalten. In allen dem Hillelismus und

LEA/G-MAGAZINO: *INFO-BEILAGE 7*

Homaranismus betreffenden Texten (auch in den anonymen aus der Zeit vor 1912) unterstrich er allerdings, daß man diese Konzeptionen nicht mit dem Esperantismus verwechseln dürfe.

Die Bezeichnung »Hillelismus« leitet sich vom Namen des Weisen Hillel ab, dem Autor des Prinzips, das zur programmatischer Grundlage wurde: Gehe mit Anderen so um, wie du möchtest, daß mit dir umgegangen wird, und höre immer auf die Stimme des Gewissens. Am Anfang sollte die Verwirklichung dieser Konzeption zur Lösung des Problems eines jüdischen Staates führen. Ausdruck der Universalisierung des Programms ist die spätere Änderung des Namens in »Homaranismus« (vom Esperanto-Wort *homaro*=Menschheit abgeleitet). Übrigens vollzog sich die Universalisierung, bevor diese äußerliche Kennzeichnung erschien. Die ursprünglichen Dogmen des Hillelismus, die aus der Zeit stammen, als Zamenhof sich nicht mehr für den Zionismus interessierte, bezeugen dies: »Die ständigen Kämpfe unter den verschiedenen Völker des weiten russischen Reiches, die schreienden Ungerechtigkeiten und Gewalttaten, die tagtäglich und bei Schritt und Tritt durch die Mehrheit der Bevölkerung an die Minderheit begangen werden, obwohl diese genau dasselbe moralische Recht wie die Mehrheit auf ihre natürliche Heimat haben, das gierige Trachten einzelner Völker gegen andere – all das hat schon vor langer Zeit viele Menschen gezwungen, eine neutral menschliche Ebene zu suchen, auf der Menschen verschiedener Nationalität und Religion – wenigstens die Söhne derselben Heimat – sich friedlich und brüderlich verständigen könnten (...). Die grundsätzliche Idee des Hillelismus wurde vor zehn Jahren geboren, hatte aber damals einen etwas anderen Charakter und war besonders dafür vorgesehen, die Beziehungen einer bestimmten Gruppe von Menschen mit ihrer Umgebung zu regeln; erst später nahm sie einen *absoluten* und von allen nationalen und religiösen Besonderheiten unabhängigen Charakter an, als einziges gerechtes Instrument zur Regelung der Beziehungen zwischen *allen* Nationalitäten und Religionen.«[5]

Der Erfolg des Weltkongresses von Boulogne ermutigte Zamenhof zur Veröffentlichung seines Programms. Ein zweiter Faktor, der darauf Einfluß hatte, waren die revolutionären Ereignisse von 1905 in Rußland. »Die gegenwärtigen Ereignisse in der Heimat der ersten Hillelisten«, schrieb Zamenhof, »zwingen sie, viel früher als beabsichtigt mit ihrem Programm an die Öffentlichkeit zu gehen. Jetzt, als Alles bei uns zu neuem Leben erwacht, als das gesellschaftliche Gewissen anfängt, Lebenszeichen von sich zu geben, als die Hoffnung aufkommt, daß wir statt Unterdrücker und Unterdrückte vielleicht bald nur 'Menschen' und 'Bürger' haben werden – jetzt ist es für uns mehr als für jedes andere Volk notwendig, eine Festlegung politisch-religiöser Dogmen vorzunehmen, die jedem Bürger unseres Vielvölkerlandes gestatten würde, zusammen mit allen anderen Bürgern in Frieden zu leben (...).«[6]

Der Verfasser bezeichnet den Hillelismus als eine Lehre, die, ohne den Menschen seiner natürlichen Heimat, seiner Religion oder Sprache zu entreißen, ihm ermöglicht, jegliche Falschheit und Widersprüchlichkeit in nationalen und religiösen Prinzipienfragen zu vermeiden, und die ihm die Möglichkeit gibt, sich auf neutral menschlicher Ebene mit Sprechern einer jeden Sprache und Bekennenden einer jeden Religion in Übereinstimmung mit den Prinzipien der Brüderlichkeit, Gleichheit und Gerechtigkeit zu verständigen.[7] Die Hillelisten zielen darauf, eine Verschmelzung der Menschheit in ein einziges »Volk« weltweiten Umfangs in die Wege zu leiten (*neŭtrale-homa popolo*=[wörtl.] neutral menschliches Volk). Geschehen soll das durch den ständigen

LKA/G-MAGAZINO: INFO-BEILAGE 7

Umgang der Hillelisten miteinander nach den Grundsätzen, die in den Dogmen aufgestellt wurden. Eine neutrale Sprache, eine neutrale Religion, sowie neutrale Bräuche sollen diesem Ziel dienen. Zamenhof benutzt ein Begriffssystem, das von dem der polnischen Sprache abweicht, und deshalb muß der Vorstellung der Grundsätze des Hillelismus eine Erklärung der Terminologie vorangestellt werden, die der Autor verwendet (was um so wichtiger ist, als die weniger elastische polnische Sprache genaue Äquivalente einiger Esperanto-Wörter nicht hergibt):

- Staat bzw. Reich (*regno*): nicht definiert; wird in der umgangssprachlichen Bedeutung gebraucht;
- Vaterland (*patrujo, patruja regno*): Staat, in dem ein Mensch geboren wurde oder dauerhaft lebt;
- Land (*lando*): geographisch bzw. kulturell besonderer Teil des Staates;
- Heimatland (*patruja lando*): Land, in dem ein Mensch geboren wurde oder dauerhaft lebt;
- Nation (*nacio*, oder genauer, *regnanaro*): Gesamtheit der Bürger eines Staates;
- Nationalität (*gento*): Gesamtheit der Menschen einer gemeinsamen Herkunft;
- Volk (*popolo, landanaro*): Gesamtheit der Bürger eines Landes;
- meine Sprache (*mia lingvo*): die Sprache, die ein Mensch am besten oder am liebsten spricht;
- Familiensprache (*familia lingvo*): Sprache, die ein Mensch im Familienkreis spricht;
- nationale Sprache (*nacia lingvo*): Begriff, den Zamenhof mit Hinblick auf die von ihm aufgestellten Definition der Nation als unrichtig ansah;
- Nationalitätssprache / ethnische Sprache (*genta lingvo*): Sprache, die von der Mehrzahl der Menschen in jemandes Vaterland gesprochen wird, ohne Rücksicht darauf, ob auch diese Person die Sprache kann;
- neutrale Sprache (*neŭtrala lingvo*): zu Zamenhofs Zeiten Esperanto, künftig eventuell eine andere durch einen Hillelisten-Kongreß zu wählende;
- Patriotismus (*patriotismo*): Dienst am Wohl der Nation, d.h. die Gesamtheit der Bürger des Staates.

In diesem Begriffssystem ist das Vaterland von Mickiewicz Rußland und sein Heimatland Litauen. Für den in Polen lebenden Russen ist seine Sprache und seine Familiensprache Russisch, aber seine Nationalitätssprache Polnisch. Bei der Vorstellung der Grundsätze des Hillelismus[8] werde ich mich gerade dieser Terminologie bedienen.

1. Für den Hillelisten existieren nur allgemein-menschliche Ideale: Bestrebungen von Nationen und Nationalitäten haben Übergangscharakter und ihr Verschwinden muß gefördert werden.

2. Alle Menschen sind ohne Rücksicht auf Herkunft, Sprache und Religion gleich.

3. Ein Land gehört allen seinen Einwohnern, ohne Rücksicht auf Sprache und Religion.

4. Im Privatleben hat jeder das Recht, eine beliebige Sprache zu gebrauchen und die Religion seiner Wahl zu bekennen.

5. Bei Kontakten mit Menschen anderer Muttersprache oder anderer Religion sollte man eine neutral-menschliche Sprache verwenden und entsprechend den Prinzipien einer neutral-menschlichen Religion handeln.

6. Neutral-geographische Namen für Staaten und Länder sollten eingeführt werden, die aus dem Namen der Hauptstadt, und nicht aus dem Namen einer Volksgruppe gebildet werden (z.B. Petersburger Reich, Warschauer Land); die Namen der Nationen sollen ähnlich neutral sein – sie sollten von Namen des bewohnten

Territoriums abgeleitet werden (z.B. *peterburg-regnano* = Einwohner des Petersburger Reiches, *varsovilandano* = Einwohner des Warschauer Landes).

7. Mitglieder sprachlicher und religiöser Minderheiten haben das Recht, Bildungs- und kulturelle Institutionen eigener Sprache zu benutzen bzw. darauf, die Feiertage ihrer Religion zu begehen.

8. In öffentlichen Institutionen für die Angehörigen verschiedener Nationalitäten soll eine neutral-menschliche Sprache gebraucht werden; gelten sollen dort neutral-menschliche bzw. staatliche Feiertage.

9. Bevor die Verwirklichung des postulierten Minderheitenrechts auf eigene religiöse und kulturelle Institutionen nicht erfolgt, soll es einer Minderheit ermöglicht werden, vermittels einer neutralen Sprache Zugang zu Kultur und Bildung zu erhalten.

10. Unter dem Begriff »Gott« wird eine höchste, unbegreifliche Macht verstanden, deren Wesen jeder sich nach eigenem Willen erklären mag.

11. Das religiöse Grundprinzip lautet: Gehe mit anderen so um, wie du möchtest, daß mit dir umgegangen wird, und höre auf die Stimme deines Gewissens.

12. Die übrigen religiösen Prinzipien werden als durch Menschen eingeführte Bräuche angesehen, deren Einhaltung freiwillig ist.

13. Da die Unterschiede zwischen den Religionen Ergebnis menschlicher Tätigkeit sind, sollen sich die Hillelisten, die aus verschiedenen religiösen Bekenntnissen stammen, so oft wie möglich mit anderen Hillelisten treffen und nach der Entstehung eines gemeinsamen, neutral-menschlichen religiösen Brauchtums streben.

14. Ein Hillelist soll möglichst oft den hillelistichen Tempel aufsuchen, und wenn das unmöglich ist, sich mit anderen Hillelisten treffen oder mit ihnen korrespondieren.

15. Im hillelistischen Tempel wird man Werke großer Lehrer der Menschheit über Leben und Tod, über das Verhältnis des »Ich« zum Universum und zur Ewigkeit hören, es werden Diskussionen über Philosophie und Ethik geführt, sowie veredelnde Hymnen gehört.

16. Auf die Frage nach der Religion, in der eine Person erzogen wurde, soll diese mit deren Namen antworten und das Wort »Hillelist« hinzufügen, womit er die Respektierung der angegebenen Grundsätze zu erkennen gibt.

Das homaranistische Konzept des Jahres 1905 unterscheidet sich geringfügig von der hillelistischen. Der Universalismus der Idee wird diesmal durch den Autor selbst unterstrichen: »Die Idee des Homaranismus wurde aus der schon bestehenden Idee des 'Hillelismus' geboren, von der sie sich nur insofern unterscheidet, als der Hillelismus ausschließlich auf *eine* Menschengruppe bezogen war, während der Homaranismus alle Völker und Religionen einschließt.«[9] Ein Anhänger dieser Idee soll auf die Frage nach seiner Sprache und Volkszugehörigkeit das Adjektiv »homaranistisch« hinzufügen, was die unchauvinistische Beziehung zur Sprache und die in den Dogmen erläuterte Nationsauffassung unterstreichen soll.

Sehr interessant ist die Ergänzung zum Punkt, bei dem es um die hillelistischen Tempel geht. In den homaranistischen Tempeln dürfen nur Ansichten verkündet werden, die zu den Feststellungen der Wissenschaft nicht in Widerspruch stehen. Außerdem wird hier die Rolle der homaranistischen Kreise erklärt, die, anders als die Tempel, ihren Mitgliedern zum Austausch von Meinungen über alle Themen dienen und rein geselligen Charakter haben sollen.

Das Konzept von 1913 enthält einige wesentliche Änderungen. Vor allen Dingen erweitert Zamenhof etwas sein früher verwendetes Begriffssystem, indem er den

Bedeutungsumfang des Wortes »Vaterland« zweiteilt. Vaterland, Vaterregion, Vaterstadt (*patruja regno*, *patruja regiono*, *patruja urbo*) bezeichnen das Land, die Region, die Stadt, in der eine Person geboren wurde. Handelt es sich aber um das Land, die Region oder die Stadt, in der eine Person dauerhaft lebt, spricht Zamenhof von Heimatland, Heimatregion, Heimatstadt (*hejmlando*, *hejmregiono*, *hejmurbo*).

Eine ausgedehntere und stärker kompromißbereite Behandlung erhält das Thema Sprache im Vielvölkerstaat. Zamenhof läßt als Übergangslösung den Gebrauch einer Amts- bzw. Mehrheitssprache in der Funktion einer neutralen Sprache auf einem bestimmten Gebiet gelten. Allerdings sollen an Orten von Konflikten mit sprachlichem Hintergrund Schulen und kulturelle Institutionen bestehen, die eine neutrale Sprache gebrauchen, damit »alle, die möchten, in einem nichtchauvinistischen, neutral-menschlichen Geist Kultur erschließen und ihre Kinder erziehen können«[10].

Als er den Gedanken der Gleichberechtigung aller Einwohner eines Staates entwickelt, unterstreicht Zamenhof, daß nicht nur die Identifizierung des Landesinteresses mit den Interessen einer bestimmten Nationalitäts- und Religionsgruppe unzulässig sei, sondern auch der Gebrauch historischer Vorwände, die eine solche Ungleichheit rechtfertigen sollen. Weniger Beachtung widmet er dagegen der neutralen geographischen Nomenklatur. Im Abschnitt, den er religiösen Ansichten widmet, führt er den Begriff des »Freidenkertums« ein. Das Bekenntnis zum Freidenkertum ist mit der Ablehnung bestehender Offenbarungsreligionen gleichbedeutend. Es soll aber nicht mit Atheismus verwechselt werden.

Die in den Dogmensammlungen des Hillelismus und des Homaranismus ausgearbeiteten Grundsätze fanden in zwei anderen größeren Arbeiten Zamenhofs Verwendung: ***Gentoj kaj lingvo internacia*** (Nationalitäten und internationale Sprache, 1911), sowie ***Post la Granda Milito. Alvoko al la Diplomatoj*** (Nach dem großen Krieg: Aufruf an die Diplomaten, 1915). In diesem letzten Text erschien auch der Vorschlag der Einberufung eines ständigen europäischen Tribunals, vor dem Regierungen von Staaten sich zu verantworten hätten. Einen optimalen, wenn auch vorläufig nicht realisierbaren Ausweg sieht der Autor in der Schaffung der Vereinigten Staaten von Europa. Ein erster Schritt hin zu diesem Ziel soll es sein, daß allen Nationalitäten gleiche Bürgerrechte in dem Land zuerkannt werden, in dem diese wohnen.

Bibliographie

1 Zamenhof, Ludoviko Lazaro: ***Originala Verkaro***, Leipzig 1929, S. 344-345
2 ebenda, S. 322
3 ebenda, S. 408-409
4 ebenda, S. 370-372
5 ebenda, S. 314-315
6 ebenda, S. 315
7 ebenda, S. 316
8 ebenda, S. 316-321
9 ebenda, S. 324
10 ebenda, S. 341

Nia leganto **Helmut Vogt** (Blücherstr. 20, D-34123 Kassel), kiu verkis la kontribuaĵon *Trankvileco* en la rubriko *Ludejo* de *Magazino* 28 (4/1999), nun proponas reklamkampanjon, kiu komenciĝu per premia konkurso ĉe la legantaro de la *Magazino*. En du leteroj li detalas pri siaj ideoj. Mi citas el tiuj du leteroj ĉi tie – en la *Informila sekcio* – ĉar la kontribuaĵoj de k-do Vogt estas pro sia temo antaŭdestinitaj por tiu ĉi rubriko de la *Magazino*.

La sloganoj, kiujn k-do Vogt proponas, levas kelkajn demandojn, i.a. pri la reklamcela uzado de la alternativa lingvonomo «ILo». Kion aliaj legantoj opinias pri tio? (GM)

el letero de 1999-12-12:

Kiel plupensludo ni povas establi ludfirmon kun la titolo

Reklamagentejo

ILo-reklamkampanjo de la legantaro komenciĝus per kolektado de ideoj, ekpensoj kaj liberaj asociadoj en la senco de «brainstorming» (cerbaerumado). Mia kontribuo stimulus pripensojn rilate al la atentigado pri ILo. Ni povus elvoki al reklamfakula konkurado en formo de

PREMIA KONKURSO:

Kiu verkos la plej bonan sloganon pri ILO? Facile superendaj ekzemploj:

- Parolu ESPERANTON – realigu la plej realisman revon de l' homaro!
- Elprovu la testindan ILOn! Permesu al vi la plezuron!
- Verda stelo: verda lumo por mondpaco.
- VERDA LUMO por senmilita estonteco.

Bonvolu skribi kaj sendi viajn kontribuojn al la *Magazino*!

el letero de 2000-01-09:

Post kelkaj pripensoj mi nun volas kompletigi mian lastan leteron rilate al la ILo-reklamkampanjo. Kompreneble celtrafa agado alparolus personojn, kiuj havas grandan influon sur la politiko – ekzemple de la Eŭropa Konsilio. La plej grava argumento estus la facila lernado pro la kono de multaj vortoj. Tial ni farus tre *simplan* propagandon por ILo laŭ la devizo «VI JAM KONAS BONE ILoN!» Tiel la prospektoj verkataj estus lingve pleje el kutimaj radikoj kaj el simboloj konataj ĝenerale.

Kiel ekzemplo por papereto aŭ glumarko:

Elprovita
Sensacia
Praktikebla
Evolupova
Racia
Alternativa
Novspeca
Tutmonde
Oportuna

LA UNIKA ILo!

(vere estontectaŭga)

La informstando de la Esperanto-Ligo Berlino ĉe *Expolingua* en 1998: kiel en aliaj jaroj lokaj esperantistoj dejoris en skipoj dum tri tagoj, disdonante informojn al lingve interesita publiko.

Limigi la makulojn de la kapitalismo ne sufiĉas

La sveda ekonomikisto kaj politikisto Carl Hendrik Hermansson, de siaj amikoj kaj adeptoj ofte nomata simple «CH», estas la dojeno de la nordeŭropa marksisma teorio. Li havas 82 jarojn kaj vivas en Stokholmo, kie li studis ekonomikon interalie ĉe Gunnar Myrdal. Kelkaj el liaj libroj pri la sveda monopola kapitalo, interalie *Koncentriĝo aŭ grandfinanco* aŭ *Svedio en la reto de imperiismo* intertempe estas klasikaj. Sian politikan hejmon li trovis en la Sveda Komunisma Partio. Dum li estis prezidanto inter la jaro 1964 kaj 1975 la partio komencis la transformiĝon al pli vasta maldekstra partio. Ankaŭ post lia foriro el la praktika politiko – li estis parlamentano dum 23 jaroj – lia influo al la maldekstra partio restas konsiderinda. Ĝis nun li estas prezidanto de la sveda Centro por Marksismaj Sociaj Studoj. Hermansson estis proksima politika amiko de la germanlingva verkisto kaj poeto Peter Weiss kaj parolis dum la funebra ceremonio. En intervjuo, kiu aperis en la germana socialisma tagĵurnalo *Neues Deutschland* la 30-an de decembro 1999, li prezentis sian aktualan vidon al la evoluo de la socialisma movado. Ĝin tradukis Roland Schnell.

Peter Weiss en sia libro Rekonvaleszenz *skribis pri vi: «Atakita de la fideluloj al Moskvo en la partio kaj de la fuĝintaj junuloj en polemika batalo kontraŭ la stalinismo en la propraj vicoj, kruele mokita de la junuloj kiel reviziisto, kiel oportunisto, ulo ne sufiĉe revolucia, reprezentas li, memregata, afabla, supera, forta intelekte, la gvidan instancon de partio, kies pereon multaj prognozis.» Kiel vi sentas vin, kiel literatura figuro?*

Mi ofte renkontis Peter Weiss, ĉar li estis membro de nia partio. Li ofte celis paroli pri politiko kaj kulturo kaj petis min prijuĝi partojn de liaj verkoj. Ni havis intiman kunlaboron. Mi tre ŝatas lin kaj mi dezirus, ke li povu esti spertinta la jaron 1989. Li estis tiel klara en siaj analizoj pri la evoluoj en orienta Eŭropo. La citaĵo el *Rekonvaleszenz* estas tre afablaj vortoj, kiujn povas krei verkisto. Tio ne estas personkulto, ĉu?

En la gazeto Flamman *antaŭnelonge vi skribis «Legu Peter Weiss». Kial?*

Ĉar estas nun pli grave ol iam antaŭe okupiĝi pri historio. Precipe por homoj, kiuj apartenas al la plej radikala laborista movado, la historio estas esence grava, ĉar okazis tiom da falsigado de la historio en la amaskomunikiloj. Ni vivas en situacio, en kiu okazas grandegaj ŝanĝoj, kaj multaj pensas, ke ne plu ekzistas idealoj, por kiuj indas batali. Tial gravas havi profundajn sciojn pri la longa batalo por la socialisma ideo, kiu postulis multajn viktimojn, kiu ofte spertis malvenkojn, sed kiu ĉiam direktis sin antaŭen. Peter Weiss per sia romantrilogio *Ästhetik des Widerstands* («Estetiko de la rezisto») kontribuis esence al la kompreno de la komplika historio de la laborista movado.

Via partio estas hodiaŭ kun proksimume 12 procentoj de la voĉoj unu el la plej grandaj maldekstraj partioj en Eŭropo. Kaj ĝi estas per longtempa kontrakto kun la socialdemokratoj kaj verduloj parto de la registara plimulto. Ĉu la partio plenumis viajn dezirojn?

Ne. Mi dezirus pli grandan subtenon de la voĉdonantoj. Ni havis post la fino de la Dua Mondmilito similajn rezultojn. Mi ĝojas, ke ni havas ankaŭ en aliaj eŭropaj landoj certan maldekstran tendencon, kaj povas esti, ke la sveda partio laŭ la ciferoj havas fortan pozicion. Por Svedio tio ne estas memkomprenebla, ĉar Svedio estis la glora lando de la reformismo, kie la socialdemokratoj realigis sian modelan socion. Svedio estis jam en la 30-aj jaroj pro la ĉi tie aplikata modelo por kontraŭagi krizojn ekzemplo por multaj aliaj landoj. Sed intertempe la socialdemokratoj perdis grandan parton de siaj voĉdonantoj, dum ni kreskis.

Kie vi vidas la kaŭzon?

Svedio estas politike kaj ekonomie tre stabila lando. La kapitalismo estas tre forta ĉi tie, la sindikata movado ankaŭ. Ĉiuj indikiloj montras, ke la socialdemokratio ankaŭ estonte restos en tre forta pozicio. Sed okazis profundaj ŝanĝoj en la sveda socio. La diferencoj inter la klasoj pligrandiĝis. La riĉuloj iĝis enorme pli riĉaj kaj samtempe ni havas elpelitojn, senlaborulojn, homojn, kiuj estas tre longe malsanaj. Samtempe inter la malnovaj socialdemokratoj estas spertebla malkontento pri la fakto, ke ilia partio sur multaj kampoj cedis al la burĝaj partioj kaj reduktis la elspezojn por la sansistemo, lernejoj ktp. La maldekstra partio plej ofte subtenis la interesojn de la koncernitaj grupoj. Plia kaŭzo de la sukceso estas, ke ĝi havas klaran socialisman profilon. Ĝi estas partio de socia justeco, feminisma partio, kaj defendas la medion.

La difinado de ĉi tiu profilo komenciĝis dum via periodo kiel prezidanto de la partio. La tiama maldekstra partio – la komunistoj de Svedio siatempe estis la dua en norda Eŭropo, kiu strebis al pli larĝa fundamento.

. . . kaj ekzistas kelkaj, kiuj diras, ke ni estis la unua eŭrokomunisma partio.

Vi antaŭenigis la plivastiĝon kontraŭ la tiam valida modelo por komunistaj partioj. Tio ne estis facila. Kial vi faris tion?

Ni spertis multajn malhelpojn, kiam ni komencis la batalon kontraŭ la stalinisma modelo de la partio. Ni serĉis kontaktojn al rondoj ekster la partio. Ni povis profiti el la kontraŭimperiisma evoluo, ekzemple la protesto kontraŭ la milito en Vjetnamo. Kaj ni certe ricevus en la jaro 1968 pli da voĉoj sen la okazaĵoj en Prago.

Post la ŝanĝoj en orienta Eŭropo la soveta partimodelo ne plu utilis kaj la plej multaj komunistaj partioj en Eŭropo, ankaŭ la Socialisma Unuecpartio en Germanio faris la saman transformiĝon kiel la sveda partio. Ĉu vi sentas vin kiel venkanto en la batalo pri la ĝusta partimodelo?

Ĉiukaze ni estis sur la ĝusta vojo. Kaj ni ne iris ĉi tiun vojon, ĉar ni estis escepte inteligentaj, sed ĉar la sociaj ŝanĝoj en Svedio starigis novajn demandojn. Ke ni faris tion en tiel frua tempo, estas kaŭzita de nia propra historio. Nia partio estis fondita en 1917 kiel socialdemokrata maldekstra partio, do antaŭ la komunismaj partioj kaj ties internacio.

Kion devas hodiaŭ fari moderna socialisma partio maldekstre de la socialdemokratoj por esti sukcesa?

Ni nun scias, ke oni ne povas esperi rapidajn venkojn, rapidajn ŝanĝojn. La aktuala disdivido de fortoj tion ne permesas. Ni devas antaŭeniri paŝon post paŝo sur la vojo de reformoj. Sed ni strebas al ŝanĝoj de strukturoj, de la potencrilatoj. Tio estas kaj estos la esenca diferenco kontraŭ la socialdemokratio, kies politiko baziĝas sur kunlaborado kun la kapitalo. Tamen oni ne perdu en laŭpaŝa reformpolitiko la stirilon. Oni devas labori la tutan tempon en la ĝusta direkto.

Ĉu tio estas la kaŭzo, pro kiu vi alte taksas la marksisman klerigon?

Dum mia tuta longa vivo mi trovis pruvite, ke la marksisma metodo estas la plej bona metodo pro analizi kaj kompreni la kapitalisman socion. Tio validas ankaŭ por la internacia evoluo de la kapitalo. Antaŭ 22 jaroj ni fondis la Centron por Marksismaj Studoj de la Socio por ricevi pli ampleksajn sciojn pri la sociaj evoluoj, elirante de la fondintoj de la marksismo, sed ne limigite al ili. Al tiu celo servas ĉiujara popola universitato, dum kiu ni foje parolis pri la «estetiko de la rezisto», kaj specialaj seminarioj.

Okaze de la 150-jara jubileo de la Komunista Manifesto *vi faris paroladon kun la temo «Kun Marx kaj la Manifesto en la jaron 2000». Kio estis via mesaĝo?*

La laborista klaso devas daŭrigi en la aplikado de la marksisma analizo. Sed tio ne signifas, ke poreterne estas difinite, kiel aspektas la socio kaj en kiu direkto ĝi evoluas. Ĉar ĉiu, kiu pretendas esti marksisto, devas matene post la vekiĝo pripensi, kio okazis en la socio, kaj tie mezuri siajn ideojn. Al tio celis Marx, kiam li diris, ke la praktiko estas la mezurilo de la teorio. La marksismo ne estas malmoderna, kiel kelkaj opinias. En Svedio oni povas konstati kreskantan intereson pri Marx. Tion montras la intereso pri la libro pri la *Manifesto* kun analizoj de 14 sciencistoj kaj verkistoj, kiu estis eldonata de la socialdemokrate dominata «Kulturhistoria Asocio de la Laboristoj» kaj kun la subteno de grandaj sindikatoj.

En la 60-aj jaroj vi rimarkis, ke Svedio estas dominata de 15 familioj. Kia estas la situacio hodiaŭ?

La koncentriĝo de la kapitalo plifortiĝis. Hodiaŭ ni havas nur du grandajn potencajn grupojn: la familio Wallenberg kaj la grupo ĉirkaŭ la ekonomia banko. La Wallenberg-grupo havas senperan influon al 30 procentoj de la plej grandaj entreprenoj de la stokholma borso. Kaj la koncentriĝo de la kapitalo pludaŭras, precipe en la telekomunikado, en la novaj komunikiloj. La koncentriĝo pli kaj pli ofte transiras landlimojn. Volvo ekzemple, kiu estas rigardata kiel tipe sveda entrepreno, estis aĉetita de Ford. La socialdemokrata ministro pri financoj Gunnar Sträng iam diris: «Kio utilas al Volvo utilas al Svedio.» Tion oni ne plu povas diri. La tutan procezon oni nomas tutmondiĝo, nova etapo en la evoluo de la internacia kapitalo surbaze de la novaj teknikaj evoluoj. Ne forgesinda la rolo de la financa kapitalismo. La internaciaj financaj transakcioj konsiderinde kreskis.

Unu el la plej grandaj financoĵonglistoj, Georg Soros, diras, ke la kapitalismo minacas la demokration.

Jes, tio estas amuza. Sed li pravas. La pli kaj pli granda koncentriĝo de kapitalo en malpli da manoj limigas la demokration.

Kaj se eĉ homo kiel Soros venas al tiu konkludo, ŝajnas esti des pli grave okupiĝi pri alternativoj.

Jes, certe. Oni povas helpe de perparlamentaj reformoj antaŭeniri certan

distancon, sed sole ili ne permesas socialisman socion, se la malnovaj potencrilatoj restos. Tial mi nur povas imagi veran ŝanĝon, se la laborantoj ricevos pli da potenco ĉe siaj laborlokoj. Tio devas laŭ mia opinio esti la elirpunkto de socia altermativo. La batalo en ĉiuj entreprenoj por la celo, ke la laborantoj ricevu pli da potenco, validas unue en la labora medio, por la salajroj, sed ankaŭ alie.

Restas la demando de la posedo?

Mi ĉefe imagas kooperativan posedon. Montriĝis, ke la ŝtata posedo ne estis la taŭga vojo. En Ĉeĥoslovakio oni eĉ ŝtatigis la frizistojn – freneze. Mi povas imagi, ke ekzistos privata posedo de akcioj, posedantoj de obligacioj. Sed sendepende de la posedo, la laborantoj devas havi pli da potenco.

En Jugoslavio estis simila eksperimento per la laborista memmastrumado. Ĝi fiaskis.

Sed ne estis la ideo, kiu fiaskis, sed la imperiismo utiligis la etnajn diferencojn por dividi la laboristaron kaj la landon. Sed komence ekzistis en la formo de laboristaj konsilantaroj ĝusta elirpunkto.

Ĉu vi vidas en la «Tria Vojo» lanĉita de Gerhard Schröder, elirpunkton por alternativo?

Tute ne, ĉar tio signifas nur pli fortan kunlaboron de la socialdemokratio kun la kapitalo. En Svedio ni havis «Trian Vojon» kun la Saltsjöbaden-kontrakto en la 30-aj jaroj, kiam oni interkonsentis kun la kapitalo: «Vi zorgas pri la produktado kaj ni zorgas pri la politiko». Hodiaŭ en sveda socialdemokrataroj okazas batalo inter la renovigantoj kaj tradiciistoj. La renovigantoj deziras pli malferman kunlaboron kun la kapitalo kaj la tradiciistoj estas tiurilate pli hezitemaj.

Ĉu vi legis la libron de Anthony Giddens pri la «Tria Vojo»?

Giddens apartenas al tiuj socialdemokratoj, kiuj kritikas la negativajn flankojn de la kapitalismo, sed samtempe perdis la kredon je alternativa socialisma sistemo. Per sia «Tria Vojo» li priskribas modelon inter la liberala merkatofundamentismo kaj la tradiciaj socialdemokrataj idealoj, dum kiu li asertas pli proksiman kunlaboron kun la kapitalo. Foje tio nomiĝas «centra-maldekstra politiko». Estas mirinde, ke la ideologoj ne faras diferencon inter mallongtempa kaj longtempa politiko. Limigi la negativajn flankojn de kapitalismo estas akceptebla celo, sed ne sufiĉas. La historia evoluo ne povas stagni je ĉi tiu punkto.

La demandojn starigis Jochen Reinert, kiu faris ankaŭ la foton.

(tradukita de Roland Schnell)

Silento pri ekologia katastofo

La intervjuo kun Gordana Brun, komisiito pri ekologio de Serbio, pri la ekologiaj sekvoj de la NATO-bombardado estis publikigita en la socialisma tagĵurnalo *Neues Deutschland* la 29an de decembro 1999. Kun ŝi parolis Hannes Hofbauer, korespondanto en Vieno, kaj tradukis Roland Schnell, kemiisto.

Ĉu ekzistas pli ol duona jaro post la fino de la milito superrigardo pri la ekologiaj problemoj, kiuj estas kaŭzitaj de la NATO?

La unuaj esploroj montras, ke Serbio dum la venontaj jaroj suferados sub la ekologiaj katastrofoj kaŭzitaj de la kemia kaj radioaktiva maniero de militado.

Gordana Brun

Vi parolas pri kemia maniero de militado? Kiel ĝi okazis?

La agreso de NATO transformis niajn fabrikojn al bomboj. Laŭplane estis atakitaj la lokoj, kie troviĝas kemiaj kaj petrolkemiaj produktejoj. Grandegaj kvantoj de toksaj substancoj estis liberigitaj. La malrekta kemia milito, kiu estas malpermesata laŭ la Ĝeneva konvencio, komenciĝis per bombado de la industriurbo Pancevo la 15-an de aprilo. Niaj analizoj kaj tiuj de la internacia esplorkomisiono de la eksa finna ministro Pekka Havisto montris, ke en Pancovo, Novi Sad, Kragujevac kaj Bor estas la centroj de la kontaminado.

Kiuj kemiaĵoj minacas la medion?

En Pancovo estis liberigitaj enormaj kvantoj de fosgeno, substanco, kiu povas kaŭzi daŭran damaĝon de spiraj vojoj. Dum la unua mondmilito ĝi estis uzata sub la [germana] nomo *Gelbkreuz* («flava kruco») kiel kemia armilo. Pancevo estis evakuadata tuj post la atako kaj forta vento transportis la fosgenajn nubojn al Rumanio.

Kion vi scias pri malsanoj en Rumanio?

Je meza daŭro certe ĉiuj, kiuj enspiris la substancon, estas koncernitaj. Precizajn informojn pri Rumanio ni ne havas.

Ĉu vi povas taksi la kvantojn de kemiaĵoj, kiuj liberiĝis?

En Pancovo estas krom la fosgeno 1200 t da finilkloridaj monomeroj, 3.000 t da natria hidroksido, 800 t da hidrogenklorido, 250 t da amoniako kaj 8 t da hidrargo.

Kia estas la situacio de la subtera akvo?

Tio estas nia plej granda problemo. La kombinaĵoj de hidrargo kaj kloro minacas la akvon. Tio rilatas precipe al Novi Sad. Tie estis bombardita rafinejo kaj grandaj kvantoj de benzino fluis en la grundon. La subgrundo ĉirkaŭ Novi Sad, maldekstre de la Danubo estas venenita, do la akvoprovizo por centmiloj da homoj. Pli ol 50 procentoj de la enloĝantaro de Novi Sad bezonas ĉi tiun akvon, kiu nun estas malsaniga. Plia tre dan-

ĝera afero estas la kanalo de Pancevo al la Danubo. Ekde la bombardadoj ĝi estas plena de kloridoj kaj pezaj metaloj kiel zinko, kadmio kaj plumbo. Tio estas minaco por la tuta Danubo. Oni bezonus 10 milionojn da eŭroj por forigi la plej terurajn kontaminojn, sed la mono mankas al ni. Ni esperas, ke la malpurigita akvo ne atingos la Danubon. . . Sed dum la fino de la vintro ekestas la risko, kiam la Danubo havas tre malaltan akvonivelon, ke la akvo de la Pankovo-Kanalo fluos en la riveron. Ĝis tiam io devus okazi.

la trafita regiono de Serbio

Kion faras la administracio?

Mankas la rimedoj al ni. Ni ne povas fari pli ol averti la loĝantaron ne uzi la akvon kaj ne manĝi la fruktojn, kiuj kreskis sur la kontaminita grundo. La agrikulturo en la plej granda parto de Vojvodino estas minacita. Post du aŭ tri jaroj estos videbla la vera amplekso de la ekologia katastrofo. Oni diras, ke la jugoslavoj antaŭ la milito informis NATOn pri la sekvoj, kiuj rezultos el la bombado de la kemiaj fabrikoj. Eĉ ekzistis mapo, sur kiu estis markitaj la plej danĝeraj produktejoj. NATO uzis ĝuste ĉi tiun mapon, kiu estis transdonita por atentigi pri la sekvoj, por direkti la bombardadon.

Dum la milito oni raportis pri disĵetbomboj kaj malkoncentrita uranio. Kiuj pruvoj ekzistas?

Ne estas duboj, ke estis uzata malkoncentrita radiokaktiva uranio. NATO mem konfirmis. Sed ni ne scias, kie tio okazis, ĉar NATO rifuzas malkaŝi la informojn, kiuj povus helpi al ni averti la enloĝantojn de la koncernaj regionoj. La sekvojn de la uzo de radioaktivaj armiloj ni povas studi en la serba respubliko de Bosnio-Hercegovino. Ankaŭ tie NATO, sub la masko de SFOR, uzis malkoncentritan uranion. Medicinaj esploroj montris, ke multaj soldatoj tie suferas sub simptomoj, kiuj similas al tiuj, kiuj estas konataj kiel «sindromo de la golfa milito». Genetikaj ŝanĝiĝoj precipe ĉe infanoj de ĉi tiuj soldatoj estas pli oftaj ol ĉe aliaj personoj.

Ĉu vi ricevas subtenon kontraŭ la radioaktiva kontaminado?

La izolita situacio de nia lando koncernas, krom malmultaj esceptoj, ankaŭ la ekologiajn katastrofojn. La okcidentaj neregistaraj grupoj tute silentas pri la kontaminado de akvo, grundo kaj aero, dum ekzemple Nikos Katsaros, la prezidanto de la greka organizaĵo de kemistoj, parolis pri la plej granda ekologia katastrofo mondskale. Multfoje mi kontaktis grupojn, kiel ekzemple Greenpeace kaj konfrontis ilin per niaj informoj. Sed Greenpeace ĝis nun per neniu vorto menciis la ekologiajn sekvojn de la NATO-bombardado. La solaj, kiuj publike montris maltrankvilecon, estas tiuj, kiuj havas ekonomiajn interesojn rilate al la Danubo.

Rimarko: La mencio, ke fosgeno (karbonila diklorido $COCl_2$) estis uzata en la unua mondmilito kiel kemia armilo, ne allasas la konkludon, ke la jugoslava armeo preparis la aplikon de kemiaj armiloj. Fosgeno estas ofte uzata interprodukto en la kemia industrio kaj elirpunkto de multaj sintezoj por produktoj de la organika kemio. Ankaŭ la aliaj menciitaj kemiaĵoj, nome hidrargo, finilklorido kaj natria hidroksido, estas tipaj por la klororganika kemio. Dum la lastaj jardekoj ekestis severa kritiko pri la ekologiaj problemoj kaŭzataj de ĉi tiu maniero de kemia produktado eĉ dum pacaj periodoj. Oni atentigis pri la katastrofaj sekvoj, kiuj povas okazi, se ĉi tiuj produktejoj estas hazarde aŭ intense detruataj en milito. La milito kontraŭ Jugoslavio montris, ke la atentigoj ne estis troigo. Estas kurioze, ke la ŝtatoj de NATO, kiuj en siaj landoj per tre severaj leĝoj provas limigi la liberigojn de ĉi tiuj substancoj dum la produktado aŭ bruligo de kemiaĵoj, en Jugoslavio akceptis ekologian katastrofon, kiu indas aperi en listo apud lokoj kiel Seveso kaj Bhopal.

Fosgeno sub normalaj kondiĉoj estas senkolora gaso kun la odoro de putriĝanta fojno aŭ fruktoj. La boltemperaturo estas 8,2 °C. Sub tiu temperaturo fosgeno estas senkolora likvaĵo.

Fosgeno atingas per la aero la pulmon kaj rapide enpenetras la epiteliajn ĉelojn de la bronkoj, de la pulmo kaj eĉ la endotelajn ĉelojn de la angioj (kapilaroj). Tie la molekuloj disfalas kaj formas kloridan acidon. Tio, kiel la fosgeno mem, perturbas la fizikajn-kemiajn kvalitojn de la ĉeloj. Samtempe estas perturbata la acido-bazo-ekvilibro de la pulma histo. El la angio eliras grandaj kvantoj da sango en la alveolojn. Ekestas edemo de la pulmo.

La minumuma toksa koncentriĝo estas 1,5 - 3 mg/l en la aero por homoj dum 2 - 3 minutoj. Dum la enspiro de fosgeno homoj sentas malagrablan dolĉan kromguston en la buŝo. Malgrandaj kvantoj kaŭzas ardon en la kolo, stimulon de tuso kaj senton de sufokiĝo. La simptomoj malaperas post forlaso de la kontaminita regiono, sed la malsano persistas. Post 4 ĝis 5 horoj la situacio de la malsanulo malboniĝas. Aperas tuso kun ŝaŭma sputaĵo, perturboj de spirado kaj ĝenerala laceco. La haŭto de la vizaĵo, de la oreloj kaj de la manoj iĝas blukoloraj. En kazo de rapida helpo eblas malrapida resanigo post 20 ĝis 30 tagoj.

Bestoj montras ĝenerale similajn reagon. En kombino kun aliaj toksaj substancoj la danĝeraj koncentriĝoj de fosgeno povas esti pli malaltaj. Fonto: *Civila defendo en la agrikulturo* de N. I. Akimov kaj V. G. Iljin, eldonejo Kolos, Moskvo 1973.

novaĵoj

Subskribkolektado koncerne tutmondiĝon

La Fondaĵo Danielle Mitterrand (vidvino de la forpasinta eks-prezidento de Francio) lanĉis subskribendan alvokon sur TTT-ejo. Ĝi klarigas la problemon de tutmondiĝo de la ekonomio kaj la minacojn en rilato kun tio. La subskribenda dokumento estas en la franca, angla, itala, hispana, portugala kaj Esperanto.

Eltiraĵo el la lastaj paragrafoj de la alvoko, tiel kiel ili aperas:

La subskribintoj de tiu alvoko proponas al ĉiuj popoloj de la mondo, ke ili kune petu kaj trudu siajn respektivajn registarojn decidi pri la tri jenaj punktoj:

1. Ĝenerala kontrolproceduro pri ĉiuj konsekvencoj de la tutmondiĝo, kaj speciale pri la respekto, fare de la Monda Organizo de la Komerco, de la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj, kaj de ĉiuj internaciaj konvencioj.

2. La starigo de tutmonda asembleo, kie estos demokrate prezentitaj kaj komparitaj la vidpunktoj de la civitanoj, laboristoj, entreprenistoj, sindikatoj, asocioj, Neregistaraj Organizoj, elektitoj, kaj de ĉiuj, kiuj, en sia vivo, iumaniere spertas la liberigadon de la interŝanĝoj.

. Moratorio, jam insiste petita de miloj da organizoj tra la tuta mondo, pri ĉiu nova liberigado de la interŝanĝoj, kaj speciale prokrasto de la malfermo de la venonta traktada ciklo de la Monda Organizo de la Komerco, ĝis kiam la kontrolproceduro estos finita kaj la tutmonda asembleo kunvenos.

Rekta aliro al la subskribenda teksto en Esperanto ĉe:
http://www.etats-generaux.ras.eu.org/esperanto.html

Sekvas la listo de subskribintoj. [. . .] salutinda iniciato! . . . (H. Masson)

Enhavo:

	paĝo
Nova jarcento komenciĝis . . . (Albert Stephan)	1
Bonvenon al la gekamaradoj de ASLE (GM)	1
Walter Poppeck – jubileulo en sindikato	2
NOVAĴOJ	3
La Socialisto	
ASLE sin prezentas	4
Unsere nächsten Veranstaltungen	5
Esperanto sen mitoj (Ziko Marcus Sikossek) recenzo de G. Mickle	6
INFORMILA SEKCIO: – Broŝuroj de Maldekstra Forumo Berlino: *Esperantistische Weltbilder (W. Usakiewicz)* (1a parto)	9
– Reklamagentejo / Premia Konkurso (Helmut Vogt)	16
Limigi la makulojn de la kapitalismo ne sufiĉas (intervjuo kun Carl Hendrik Hermansson trad. de Roland Schnell el *Neues Deutschland*)	17
Silento pri ekologia katastrofo (intervjuo kun Gordana Brun trad. de Roland Schnell el *Neues Deutschland*)	21
NOVAĴOJ	24

LEA/G-Magazino ankaŭ en interreto: http://home.germany.net/101/121591/leag/